

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 11

NOVEMBRO, 1946

NOVA PERIODO KOMENCIĜAS POR INTERNACIA KULTURO

monata grandformata (33×24 cm.) 16-paĝa gazeto, organo de Bulgara Esperantista Asocio.

Redaktata ekskluzive en Esperanto. Luksa eldonaĵo, riĉe ilustrita. Celo de la revuo estas diskonigi la kulturanojn, societanojn, kaj ekonomian vivon de la balkanaj landoj.

La enhavo estas diversa kaj tre interesa : rakontoj, versaĵoj, belartaj pentraĵoj, artikoloj, sciigoj pri la Esperanto-movado, k.t.p.

La nova periodo estos Septembro 1946 ĝis Decembro 1947, kaj ampleksos 16 numerojn po 16 paĝoj. La abonkosto por la periodo estas 11 anglaj ŝilingoj, aŭ la sumo de la IEL MA-kotizo por 1947 plus 10%.

Abonu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Specimena numero sendata kontraŭ respondkupono

(en Britujo 3 pencoj)

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiuj du vortoj.

Kiu klubo en Danujo, Belgujo, aŭ Norda Francujo inklinas aranĝi intergastadon kun klubo en Hilversum en la somero de 1947? Skribu al Klubo Drevés Uitterdijk, Jonkerweg 11, Hilversum, Nederlando.

Ilustritajn kartojn el la tuta mondo kolektas kaj al ĉiu sendos Jaroslav Hošek, ŝparkaso en Doksy u Máchova jezera, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi kun anglaj kaj amerikaj Esperantistoj Valentin Huber, Waldschulstrasse 26, München 59, Bayern, Germanujo.

Letervesperon aranĝos Esperanto-sekcio L.E.E.N. en Haarlem, Nederlando, je la fino de Decembro 1946. Volonte ni ricevos leterojn, poŝtkartojn ilustr., k.t.p. Ĉiun sendinton ni respondos. Adreso: S-ro W. ter Braake, Borneostraat 25, Heemstede, Nederlando.

Kvartalunuigo festos en la komenco de Decembro. Esperantista grupo petas leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn por instigi aliajn anojn lerni Esperanton. Skribu al la prezidanto: P. van Gulik, Voltastraat 9 B, Schiedam, Nederlando.

Lernejestroj, instruistoj, arkitektoj: sendu planojn, skizojn, pentraĵojn, fotografadojn, bildojn kaj proponojn pri kaj por konstruota burĝa kaj popola lernejo. Speciala komitato decidis pri viaj sendaĵoj kaj publikigos aŭ eĉ rekomencos la plej bonajn. Vlastimil Severa, direktoro de popola lernejo en Doksy ĉe Mácha-lago, Bohemio, Ĉeĥoslovakujo.

Per belaj poŝtkartoj deziras korespondi kun partoprenontoj de la 32a Kongreso en Bern Václav Špur, dispanoto de ŝparkaso, Doksy ĉe Mácha-lago, Bohemio, Ĉeĥoslovakujo. Afranku bildflanke.

Kun gesamideanoj el la tuta mondo deziras interŝanĝi poŝtkartojn bele ilustritajn Ph. Mr. Blažena Köhlerová, apotekistino, Doksy ĉe Mácha-lago, Bohemio, Ĉeĥoslovakujo. Afranku bildflanke. Respondo garantiata.

Fraŭlino Marie Serventi, 87 rue Edouard Maury, Fontenay-sous-Bois, Seine, Francujo, deziras korespondi kun gesinjoroj el ĉiuj landoj per poŝtkartoj kaj leteroj. Certa respondo.

Fredericia Esperantoklub, Danlando, aranĝos en Februaro 1947 letervesperon. Skribu multnombre. Respondo garantiata. Adreso: Havepladsvej 136-I, Fredericia, Danlando.

Deziras korespondi kun fraŭlino en Svedujo S-ro F. D. Buck (aĝo 20), 78 Canterbury Road, South Willesboro, Ashford, Kent, Anglujo.

Skribu al Aŭstrujo. En la urbo Graz okazos letervespero. Por propagandi efike nepre afranku filatele. Certa respondo. Anton Podretschek, Sackstrasse 16, Graz, Aŭstrujo.

Samideanoj, kiuj havas eblecon, bonvolu sciigi Kesicki Halina en Bavarujo, Bad Kissingen, Mein Franken, antaŭe Tannstr. 7, Grafen Zeitlich, ke ŝia patro vivas en Polujo-Tomaszow Maz., Zytunia 4, Kesicki. Ankaŭ sciigu patron se ŝi ie forestas. Elspezoj repagotaj.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Kultura Kunularo Internacia. La Gildo de Sankta Ajdan invitas vian interon. Gildestro: Roye England, (Del. I.E.L.), Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo.

Brita oficiro deziras korespondi kun geislamanoj. J. Cameron, Lloyds Bank, Wolverhampton, Anglujo.

Eŝua Bohor Koen, Gorna Gumaja, pl. Mite Markov 2, Bulgarujo, deziras reprezenti fremdlandajn komercajn kaj industriajn firmojn. Bankreferencoj bonegaj, eventuale bankgarantiaĵoj. Korespondas Esperante.

Deziras korespondi en la angla lingvo aŭ en Esperanto, aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn Robert Letsche, Niederstotzingen (14a), Krs. Heidenheim, Würtemberg, Germanujo.

Juna fraŭlino (21-jara) deziras korespondi kun orientaj gesamideanoj; certe respondos F-ino Maude Lowther, 105 Hainton Avenue Grimsby, Anglujo.

Rekuniĝa vespero. Bonvole sendu bildkartojn por prui la internaciecon de Esperanto. 6a Januaro 1947. Respondo garantiata. S-ro W. A. Murgatroyd, 76 Sutcliffe Avenue, Grimsby, Anglujo.

Filatelistoj! Mi deziras interŝanĝi uzitajn kaj neuzitajn poŝt-kovertojn kaj poŝtkartojn. Elwood R. Etter, R.R.1, Bradford, Ohio, Usono.

Letervesperon aranĝos januare 1947 Esperanto-Societo de Upsala, adreso: Prez. G. Norling, Box 1828, Upsala 9, Svedujo. Ni esperas ricevi respondojn el la tuta mondo kaj salutas samideane. Respondo garantiata.



Eldonejo kaj Redakcio: Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-ro 11

NOVEMBRO, 1946

NEŬTRALECO

En antaŭa numero ni faris aludon pri nia sisteno pri neŭtraleco, kaj iom difinis nian koncepton pri tio, kio estas neŭtraleco. Ni ne volas ĉi tie ripeti niajn vidpunktojn, sed sekve de iuj korespondajoj kiuj atingis nin, kaj de diversspecaj komentarioj kiuj aperis en tendencaj kaj tiel nomitaj *sendependaj* gazetoj, ni volus aldoni al la opinioj jam esprimitaj.

Iuj korespondantoj skribis al ni alvokante, ke ni faru nian gazeton *libera forumo* por la prezentado de ĉiuj vidpunktoj, kaj emfazis, ke sekve de la stimulo al aliaj opiniesprimoj, eĉ kontraŭaj, tio aldonus al la intereso de nia gazeto. Tre rimarkinde estas, tamen, ke tian admonon plej ofte akompanas forta, tendenca, parti-politika, aŭ eĉ malica atako kontraŭ iu organizajo aŭ persono. Tial ni venis al la konkludo, ke la plimulto de tiaj korespondantoj tute ne interesigas pri la bonfarto de nia gazeto, sed nur pri la publikigo de la propraj, ofte malprudentaj kaj mallarĝaj, vidpunktoj. Ni gardas la rajton juĝi ne nur pri tio, kio povos esti ofenda al la plimulto de niaj legantoj, sed ankaŭ pri tio, kio konformas al la normo de bona ĵurnalisma etiketo.

Sed en tute alia kategorio estas la kritiko entenata en decidoj faritaj en la Unua Balkana Esperanto-Konferenco, kiu okazis en Assenovgrad, 26an de Aŭgusto, 1946, el kiuj unu postulas, ke I.E.L. "ŝanĝu sian pasivan, neŭtralan sintenon rilate faŝismon kaj reakcion."

En tiuj decidoj oni parolas ankaŭ pri demokrateco. Necesas unue difini niajn terminojn. Ŝajnas al ni, ke la vera koncepto de demokrateco havas nenion komunan kun la ideoj esprimitaj de niaj Balkanaj amikoj (ekz. reakcia politika partio, kiu persvadis la plimulton de la popolo subteni ĝin, estas demokrate elektita; sed verŝajne tio ne estas la signifo, kiun donis al la vorto la Konferenco). I.E.L. estas starigita de siaj membroj, kiuj difinas siajn reprezentantojn. Tiuj administras la

Ligon laŭ la deziroj de la membroj; la membroj rajtas, kaj povas, ŝanĝi siajn reprezentantojn, kaj povas pere de ili fari ŝanĝojn en la konstitucio, kiujn ili opinias dezirindaj. Jen perfekta demokrateco!

Mi ne povas ne rimarkigi la kuriozan interpreton de niaj Balkanaj samideanoj pri la vorto *demokrata*. Vortoj en Esperanto, kiel ankaŭ en naciaj lingvoj, havas modojn, kaj en la lasta tempo oni inklinas uzi tiun vorton ne laŭ ĝia vera signifo, sed laŭ signifoj *proleta, klasbatala, laborista* k.s. Tio ne estas ĝusta. Demokrateco mem ne havas rilaton kun partio aŭ klaso, sed rilatas nur al sistemo de regado.

Se do, I.E.L. ne aktive sin okupas pri "kontraŭ-faŝismo kaj reakcio" tio estas laŭ la volo de ĝiaj membroj. Sed tio ne signifas, ke la plimulto de la membroj private ne estas kontraŭ la faŝismo kaj la reakcio. Tio signifas, laŭ nia interpreto, ke ili deziras, ke I.E.L. sin ded.ĉu al la praktikaj taskoj propagandi Esperanton, kunligi la Landajn Asociojn, fari sian eblon akceptigi Esperanton kiel eble plej baldaŭ, kaj fari diversajn servojn al siaj membroj.

La Estraro de I.E.L. tute ne havas mandaton de la membroj, ke la organizajo sin okupu pri iuj politikaj okazaĵoj en kiu ajn parto de la mondo. Tio ne estas ĝia agadkampo, kiu cetere estas klare difinita.

Cetere, mi mem, malgraŭ ke mi havas fortajn politikajn kredojn, ne volas, ke I.E.L. propagandu tiujn kredojn, ĉar se jes, por agi tute juste kaj senpartiece, ĝi devus propagandi ankaŭ aliajn tendencojn por mi malŝatajn.

Ni tial insiste ripetas, ke I.E.L. estas tute demokrata organizajo, sed neŭtrala, kaj tiel longe kiel ĝiaj membroj volos, ĝi konservos tiun koncepton pri neŭtraleco, kiun ĝi ĝis nun havis, ne por la profito aŭ malprofito de tiu aŭ alia sekcio de la movado, sed por la bono de Esperanto, kiu estas ĝia sola celo.

LA PETSKRIBO

La letero de S-ro V. en la nuna numero atentigas pri tre grava faktoro en nia kampanjo—kvanto kaj ĝia rilato al la Esperanto-movado. Ni jam sciiis tion, kaj kompreneble supozis, ke almenaŭ ĉiu Esperantisto subskribos la deklaron. Evidentiĝis tamen, ke tio ne okazis. Ĝis nun ne ĉiu Esperantisto faris sian kontribuon, eĉ per simpla subskribo de la propra nomo! Tion pravas la ciferoj mem, ĉar ja troviĝas en la mondo pli ol 150,000 Esperantistoj. La granda plimulto de la subskriboj tre verŝajne estas de ne-Esperantistoj, kio atestas pri la granda propaganda valoro de la Petskribo; sed aŭtoritatoj kiuj interesiĝis pri la afero kredos, ke almenaŭ la Esperantistoj mem subskribis, kaj tial ili povos malalte taksii la amplekson de la Esperanta popolo. Ĉu vi do, kiu legas ĉi tion, jam subskribis? Kaj ĉu vi certigis al vi, ke ankaŭ ĉiu al vi konata Esperantisto simile faris?

Ni volus atentigi al niaj kunlaborantoj pri grava afero rilate al la klasifikado. Ĉu pro nescio, ĉu pro malatento, fakte estas, ke iuj, inter tiuj kiuj alsendas al ni la foliojn, ne agas konforme al nia sistemo de klasifikado. Aparte de la listoj, kiuj aperas ĉiumonate en *E.I.*, ni sendis al ĉiuj detalajn instrukciojn pri la grupigado de la folioj, sed krom tio, ke centoj da subskriboj venas al ni sub klasifiko *Metiistoj* (kiun, parenteze, ni ne havas; nia grupo estas *Metiistoj Diversaj*—tio estas metiistoj ne aliloke klasifikeblaj), oni ankaŭ sendas al ni grupojn, kiujn ni tute ne havas, ekzemple: *Emerituloj, Profesuloj, Klerulinoj, Privataj Oficistoj, Diplomitoj, Lernantoj* (ĉu tiuj estas lernejoj, aŭ metiaj?).

Kiam la lingvo apartenas al okcident-Eŭropa grupo ni ofte povas diveni la klasifikon al kiu subskribo apartenas, sed pri iuj lingvoj, ekzemple, Finna, Jugoslava, Bulgara, Greka, k.s. ni tute ne povas. Cetere la reklasifikado postulas de ni tre multan tempon, kiun ni devas domaĝi. Ni do petas al niaj amikoj, ke ili helpu nin kiam eble per konforma agado.

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis 5a de Oktobro:

Landoj

Aŭstralio ..	2209	Francujo ..	6257
Aŭstrujo ..	51	Germanujo ..	574
Belgujo ..	3385	Grekujo ..	473
Brazilo ..	4129	Hindujo ..	54
Britujo ..	14824	Hungarujo ..	2376
Bulgarujo ..	20557	Irlando ..	209
Ĉeĥoslovakujo ..	7799	Islando ..	3775
Danujo ..	3777	Italujo ..	1463
Egiptujo ..	1411	Jugoslavujo ..	9236
Finnujo ..	6189	Kanado ..	231

Maroko ..	947	Sud-Afriko ..	68
Nederlando ..	27123	Svedujo ..	15409
Norvegujo ..	9572	Svisujo ..	910
Nov-Zelando ..	2200	Usono ..	3947
Palestino ..	387	Ceteraj lokoj ..	195
Polujo ..	11		
Portugalujo ..	3115		152863

Okupoj

Artistoj ..	851	Navigaciistoj ..	598
Delegitoj ..		Parlamentanoj ..	76
Komunumaj ..	188	Policistoj ..	909
Dentistoj ..	237	Presistoj ..	1440
Desegnistoj ..	837	P.T.T.-istoj ..	3301
Dommastrinoj ..	22882	Religiistoj ..	540
Edukaj ..		Sciencistoj ..	579
Aŭtoritatuloj ..	497	Sindikatejoj ..	216
Elektristoj ..	1172	Soldatoj ..	1963
Farmaciistoj ..	498	Studentoj ..	13429
Farmistoj ..	6007	Soforoj ..	1186
Hotelistoj ..	650	Ŝtatoficistoj ..	3450
Inĝenieroj ..	5382	Teknistoj ..	722
Instruistoj ..	8604	Transportistoj ..	6856
Juristoj ..	726	Urboficistoj ..	1593
Ĵurnalistoj ..	494	Vendistoj ..	4337
Komercestoj ..	26068	Vestistoj ..	2187
Konstruistoj ..	2791	Diversaj ..	8098
Kuracistoj ..	2051		
Laboristoj ..	10291		152863
Lingvistoj ..	112		
Metiistoj ..			
Diversaj ..	11045		

Informpetoj al Delegitoj

S-ro A. Turner en Aŭstralio atentigas nin pri tio, ke tre ofte li ne povas respondi al informpetoj, sekve de tio, ke la skribado estas nelegebla. Ni ankoraŭfoje emfazas, ke plej konsilinde estas, skribi la nomon kaj adreson preslitere, kaj nepre en nacia lingvo. Tre ofte korespondantoj skribas sian adreson en Esperanto, ne atente, kaj tia adreso sur koverto verŝajne ne estas komprenebla por la poŝtistoj.

Peto

S-ro R. F. Vaughan, nia Delegito en Sandakan, Borneo, kiu perdis ĉion dum la Japana invado, tre deziras rekollekti siajn jam presitajn verkojn, kaj tre danke ricevos, ĉu donece, ĉu pruntedone, ĉu kontraŭ pago, ĉiujn gazetajn numerojn, kiuj enhavas tiujn, kun escepto de *Esperanto Internacia* de 1940 ĝis nun, kiujn li jam posedas. La verkoj troviĝas en *Heroldo de Esperanto* de 1936 ĝis la ĉesigo, en *La Pivato*, en *El Verdavaldo*.

Eĉ manskribita kopio, aŭ nur la gazetnumera nombro kun la dato estos tre bonvena.

Antaŭdankon al ĉiuj.

RAPORTOJ PRI LA MOVADO

BRAZILo

La grava kaj bonfarema Popola Universitato "Prez. Roosevelt" en Sao Paulo, kiu ludas gravan rolon en la popola klerigo en tiu urbo, lastatempe decidis alpreni Esperanton kiel unu el la instruotaj lingvoj en siaj novaj kursoj. La propagando pri la kursoj estas farata de la Universitato mem, pere de ĉiutagaj ĵurnaloj, radio, afiŝoj kaj flugfolioj. La ago de tiu institucio estas grava paŝo al la ĝenerala enkonduko de Esperanto en la edukadon.

Tagĵurnaloj kaj aliaj eldonaĵoj tre favore raportas pri la Esperanto-movado, kaj aparte menciinda estas la tagĵurnalo *A Noite* (Rua 7 de Abril 374, S. Paulo) kiu preskaŭ ĉiutage presigas en sia *Esperanta Fako* informojn pri nia movado. Oni instigu kaj danku la redakcion ĉe la supra adreso.

Radio Tupi de S. Paulo (P.R.G.2) 104m.—Tiu radiostacio estas tre simpatia al Esperanto kaj disponigas 10 minutojn ĉiulunde de 11.30 ĝis 11.40 (Greenwich).

Sekve de la sukceso de la Petskribo, la Klubo en S. Paulo mem presigis 10.000 foliojn, kaj jam kolektis pli ol 3.000 subskribojn.

La XIa Brazila Kongreso okazos en S. Paulo laŭ decido farita en la antaŭa kongreso. Organiza Komitato jam estas elektita kaj eklaboris.

O. L. de M., S. Paulo

ĈINUJO

Ĉengtua Esperanto-Ligo stariĝis antaŭ pli ol jaro, sed pro malfacilaj politikaj cirkonstancoj nur proksimume 50 samideanoj aliĝis ĝis nun. En la pasinta jaro oni aranĝis du Esperanto-ekspoziciojn, kaj ankaŭ unu ĉi-jare okaze de la 59a Esperanto-festo. Kvin kursoj estis starigataj post la ekspozicioj. Oni ankaŭ disaŭdigis programojn en Esperanto pere de la radiostacio Ĉengtua. La 14an de Julio la dissendo enhavis la jenajn programojn: kantojn (*La Espero*, *La Fluanta Tajdo*, *Lasta Rozo*, *Kiam Vespero Venas en Valon*, *Lorelej*), deklamadon, paroladojn, informojn kaj dramlundon *Verda Stelo*. La radiostacio jam konsentis, ke oni dissendu Esperanton malpleje 30 minutojn en ĉiu monato.

La Ĉengtua klubo konsistas plejparte el ĵejnuloj, kiujn forte inspiras la ideo de D-ro Zamenhof. Ili estas tre entuziasmaj kaj havas planojn pri estonta agado.

Lūalinn, Ĉinujo

DANUJO

Someraj Kursoj. Mirinde estas, ke la someraj kursoj en Danujo ne ĉesis dum la tuta milito, sed ĉi-jare la granda diferenco estis, ke ili denove fariĝis internaciaj. Ili okazis en Hadsten (13an ĝis 27a de Julio) kaj en Helsingør (28an de Julio ĝis 4a de Aŭgusto), kaj krom la Skandinavoj ĉeestis ankaŭ kelkaj partoprenantoj el aliaj landoj (Islando, Britujo kaj Nederlando), kaj tio sufiĉis por krei la ĝustan atmosferon. Krome, ĉeestis du ĝeinstruistoj el eksterlando (eks-Rumano, S-ro T. Morariu, kaj S-ino Major el Anglujo).

La partoprenantoj montris grandan entuziasmon per multnombra aliĝo al la kursoj, precipe al tiuj de la eksterlandaj ĝeinstruistoj, kaj petis multajn informojn pri la dumilitaj spertoj de la alilandanoj. Malgraŭ la malalta kosto de la restado, la kursoj ankaŭ finance sukcesis.

Okazis elementa, daŭriga, konversacia kaj seminaria kursoj, kaj instruado pri la historio de la movado, kaj kantoj. En Hadsten, malgranda vilaĝo iom norde de Aarhus, la nombro montriĝis ideala: po proksimume 60 personoj en ĉiu semajno.

La ĝenerala unioj estis, ke oni multon lernas per tiaj koncentritaj kursoj (3 horoj ĉiutage). Nun la Centra Dana Ligo serĉas plurajn eksterlandajn ĝeinstruistojn por la vintraj kursoj. La grupo en Fredericia eĉ organizas lotieron por starigi kason, el kiu oni pagos la salajrojn. Inter la someraj kaj vintraj kursoj, okazos ankaŭ aŭtunaj kursoj, ĉi-jare en Vejle.

C.M.

URUGVAJO

En Montevideo Prof. Fernández Menéndez aktive propagandis Esperanton ĉe la Pedagogia Muzeo kaj Kristana Asocio de Junuloj, en kies sidejoj respektive li gvidas kursojn. La sama profesoro, en kunlaboro kun Prof. Balech el Argentino, nun preparas eldonon de nova vortaro Esperanta-Hispana.

La Instituto de Esperanto, Montevideo, sub gvidado de D-ro Pfeffer, daŭre eldonas siajn trafikajn informilojn.

La ĉefurba gazetaro daŭre publikigas informojn pri Esperanto kaj progreso farita tra la mondo.

En la *Radio Ariel* S-ro Cao prelegis kiel Esperantisto okaze de la 6-a datreveno de la nazi-invado de Polujo. Tio estis disaŭdigo aranĝita de *Voz de Polonia* (Voĉo de Polujo), kies direktoro tre favoras nian aferon. Oni ankaŭ disaŭdigis Esperanto-melodiojn pere de diskoj.

D-ro R. Zeballos Morales

Katolikoj

Fondiĝis en Siracusa, Italujo, *Katolika Esperanto-Asocio "Sankta Petro"* kun celoj disvastigi katolikajn sentojn kaj disvastigi Esperanton inter Katolikoj. Direktoro estas Paroĥestro Luigi Scata.

Metafiziko

La Universala Akademio de la Regado Kosmo-Astrozofia akceptis Esperanton, kiel oficialan lingvon por internaciaj rilatoj. Laŭ ĝia statuto la Akademio proponas elvolvi la studadon de ĉio—tiel grava, kaj ĝenerale malbone konata kaj neestimata—kio konsistigas la okultan sciencan.

Ĝia intenco estas apartigi la spiritismon, astrologion kaj similajn studojn, de la superstiĉaj kredaĵoj, kaj akiri tian aŭtoritaton, kian jam posedas la aliaj sciencoj ĉie konataj. Adreso: U.A.R.K.A., Trieste, Via Carducci 12, Italujo.

R.D.

Projektata Sciencia Revuo

La alvenintaj respondoj al mia alvoko en la Aŭgusta numero de *E.I.* sciigis min, ke la neceso de sciencia revuo Esperantista estas rekonata, kaj ke ni tial devas plu pripensi la aferon. La Akademia Esperanto-Klubo en Praha klopodos pri la baldaŭna realigo de tiu necesa revuo, kaj ĝi komence organizos reton de kunlaborantoj inter la gesamideanaro, ĉar la estonta Revuo nepre bezonos sufiĉe vastan bazon de tiaj kunlaborantoj. Oni bezonos resumojn, enhavojn, tradukojn, recenzojn, originalajn artikolojn k.t.p. Ni petas, ke ĉiu interesiganto skribu al la subskribinto por sciigi, en kiuj fakoj sciencaj (matematiko kaj logiko, fiziko, kemio, biologio, psikologio, sociologio, filozofio) li laboras, kaj el kiuj mondaj sciencaj revuoj kaj gazetoj li ĉerpos la resumojn aŭ tradukojn. Se ni sukcesos organizi tiun ĉi reton de kunlaborantoj, ni certe faros utilajn servojn al ĉiu estonta sciencia revuo. Nia unua devo estas, do, organizi la kunlaborantan reton; dua devo, akiri minimume 300 aliĝojn de abonontoj, kio ebligus al ni aperigi la unuan numeron de Sciencia Revuo en ne tre malproksima tempo.

Skribu tuj al S-ro Jaroslav Hanuš, Kladno 1997, Ĉeĥoslovakujo.

Turismo

La Franca Nacia Fervoja Societo respondas en Esperanto al ĉiuj demandoj pri la vojaĝoservo en Francujo. La adreso estas: Bureau des Renseignements, Gare St. Lazare, Paris. Skribu kaj skribigu por enradikigi Esperanton en tiu administracio.

R. Retault (ILEPTT)

Grava Ĵurnalisma Provo

Por pruvi, ke Esperanto estas tre valora kaj utila en la praktiko, ankaŭ kiam temas pri la gazetaro, ni starigas Danan-Esperantan gazetaran oficejon. Ni serĉas artikolojn de ĉiuj landoj (pri ekonomio, komerco, scienco, arto, fakoj, politiko, kulturo, junularo, turismo k.t.p.), aktualajn raportojn (pri elektado, gravaj festoj, aliaj okazintaĵoj, kongresoj, naturkatastrofoj k.t.p.) biografiojn de konataj homoj, tradukitajn aŭ originalajn literaturajojn (noveloj, poemoj, humorajoj k.s.). Ni prizorgas la tradukon el Esperanto kaj sendas la manuskriptojn—laŭ speco—al ĉiutagaj gazetoj, fakaj ĵurnaloj aŭ semajnaj revuoj. Ni ankaŭ bezonas fotografajojn el ĉiuj mondpartoj.

Ĵurnalistoj, verkistoj kaj aliaj Esperantistoj, kiuj volos liveri materialon—ni ne povas ĉi tie pro manko de loko doni detalan informon—bonvolu skribi al ni kaj ni donos ĉiujn informojn. Redaktoro Rich. G. Nielsen, Herlufmagle, Sjaelland, Danujo.

Filatelato

Sekve de agado de la Internacia Filatela Esperanto-Klubo en Parizo, la Francilingvaj fakeldonaĵoj, *Le Timbre* kaj *Le Journal du Timbre* disponigas spacon por la propagando de Esperanto. Petu senpagan ekzempleron de: *Le Timbre*, 5 rue Lamartine, Paris 9, kaj de: *Le Journal du Timbre*, 46 rue de l'Echiquier, Paris 10.

Krome, la firmo Hutin en Parizo uzas de nun Esperanton kaj celas publikigi katalogon de poŝtmarkoj de Francujo kun indikoj en Esperanto.

R.F.

PLI OL FANTAZIO

Novelkolekto de

AGNES BOGH-HOGSTED

Tradukita el la dana lingvo de

C. GRAVERSEN

Prezo 3ŝ. 9p., afranko 3p.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

32a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, Svisujo. 26 Julio-2a Aŭgusto, 1947

Adreso por ĉiuj komunikaĵoj, Bundesgasse 20, Bern.

Loka Kongresa Komitato.

Prezidanto : H. Buchli.

Vic-Prezidantoj :

J. Gillard, Prez. S.E.S.

O. Walder, IEL Ĉefdelegito.

W. Streun, Prez. Berna Esp. Grupo.

1a Sekretario : O. T. Nicolaisen.

2aj Sekretarioj : E. Keiser.

F-ino A. Schweighauser.

Financ-komitato : A. Hilfiger kaj H. Mollet.

Komitato por Loĝejoj : Prez : H. Mollet.

Gazet-komitato : Prez : D-ro A. Baur.

Komitato por ekskursoj kaj amuzaĵoj :

C. Jaccard kaj H. Küttel.

Kongreskotizoj. Ĝis Dec. 31 sv. fr. 25

Mar. 31 sv. fr. 30

poste sv. fr. 35

Por la edzo aŭ edzino de kongresano :

12, 15 aŭ 20 sv. fr. laŭ la supraj datoj.

Por gejunuloj ne pli ol 20-jaraj : 10, 12

aŭ 15 sv. fr.

Pagejoj. El multaj landoj oni povas pagi rekte al la Kongresa Oficejo aŭ al IEL. En la venonta informilo ni esperas doni informon pri pagejoj en aliaj landoj.

Programo. Provizora programo estas jam preskaŭ preta, kaj ni esperas presigi ĝin en la venonta numero de *E.I.*

Kongres-gazeto. La unua numero aperos en Novembro kaj estos sendata al ĉiu kongresano. Ĝi enhavos plenan informon pri la aranĝoj.

Blinduloj. Konforme al la Kongres-regularo de IEL blindulo kaj lia gvidanto ricevas senpagan kongreskartojn ĝis la fino de Marto 1947 ; poste ili devas pagi kongreskotizon po 5 ŝilingoj anglaj aŭ galvaloro. La aliĝilo de blindulo devas esti subskribita de blindula organizaĵo, aŭ de kuracisto, aŭ de delegito de IEL.

Loĝejoj. Ĝustatempe oni sendos loĝmendilon al ĉiu kongresano. Krom hoteloj, pensionoj, kaj privataj loĝejoj oni esperas aranĝi komunajn malmultekostajn loĝejojn por junuloj kaj malriĉuloj.

Fakkunsidoj. Tiuj, kiuj volas aranĝi fakkunsidojn estas petataj sendi informon al la L.K.K. kiel eble plej frue, kun indiko pri la supozebla nombro da ĉeestantoj.

Unua Listo de Kongresanoj

1. Int.-Gen. L. Bastien, Paris, Francujo
2. C. C. Goldsmith, Rickmansworth, Britujo
3. S-ino C. Goldsmith, Rickmansworth, Britujo

4. H. Buchli, Bern, Svisujo
5. J. Gillard, Neuveville, Svisujo
6. O. Walder, Romanshorn, Svisujo
7. Ing. Walter Streun, Bern, Svisujo
8. A. Hilfiger, Lausanne, Svisujo
9. D-ro A. Baur, Bern, Svisujo
10. H. Mollet, Bern, Svisujo
11. S-ino Fischer, Bern, Svisujo
12. O. T. Nicolaisen, Bern, Svisujo
13. Emil Kaiser, Bern, Svisujo
14. F-ino A. Schweighauser, Bern, Svisujo
15. Ch. Jaccard, Bern, Svisujo
16. H. Küttel, Bern, Svisujo
17. D-ro K. Hebeisen, Bern, Svisujo
18. P. W. Baas, Amsterdam, Nederlando
19. P. Blaise, Liverpool, Britujo
20. Kap. R. Bugge-Paulsen, Oslo, Norvegujo
21. D-ro G. Canuto, Parma, Italujo
22. D-ro J. Couteaux, Sèvres, Francujo
23. E. Dahl, Uddevalla, Svedujo
24. D-ro C. Domingues, Rio de Janeiro, Brazilo
25. R. Dubois, Paris, Francujo
26. W. Grolleman, Lochem, Nederlando
27. K. Th. Hansen, Gentofte, Danujo
28. D-ro O. Huber, Uetendorf-Thun, Svisujo
29. D-ro P. Kempeneers, Uccle-Bruxelles, Belgujo
30. D. Kennedy, Glasgow, Skotlando
31. D-ro I. Lapenna, Zagreb, Jugoslavujo
32. B. E. Long, Watford, Anglujo
33. E. Malmgren, Stockholm, Svedujo
34. Prof. St. Minkov, Sofia, Bulgarujo
35. A. C. Oliver, Rickmansworth, Anglujo
36. P. Petit, Rosny-sous-Bois, Francujo
37. J. R. Scherer, Los Angeles, Usono
38. J. Stenström, Ulricehamn, Svedujo
39. H. W. Holmes, London, Britujo
40. S-ino N. Holmes, London, Britujo
41. F-ino N. Hansen, Halifax, Britujo
42. J. G. Teare, Liverpool, Britujo
43. F-ino E. Baldwin-Smith, Barry, Britujo
44. J. L. Ford, London, Britujo
45. E. L. Johnson, London, Britujo
46. W. Haines, London, Britujo
47. T. K. Slade, Southampton, Britujo
48. E. G. Marin, Whiteway, Britujo
49. H. Hyams, London, Britujo
50. S-ino M. Hyams, London, Britujo
51. A. G. Tucker, Canterbury, Britujo
52. Pastro T. W. Roff, Bolton, Britujo
53. T. J. Gueritte, Surbiton, Britujo
54. S-ino M. L. Gueritte, Surbiton, Britujo
55. F-ino A. Fotherby, Surbiton, Britujo
56. E. Jackson Laurie, Bournemouth, Britujo
57. S-ino M. de Rycke, Ghent, Belgujo

58. P. H. Lewis, Didcot, Britujo
59. B. Wells, Didcot, Britujo
60. F. Walther-Born, Gerlafingen, Svisujo
61. W. Laederach, Zürich, Svisujo
62. W. H. Bolton, Dorchester, Britujo
63. S-ino D. H. Bolton, Dorchester, Britujo
64. F-ino J. H. Bolton, Dorchester, Britujo
65. F-ino O. Robotham, Stockton-on-Tees, Britujo
66. S-ino H. de Vere, Wrotham, Britujo
67. J. D. Applebaum, Sheffield, Britujo
68. S-ino C. Applebaum, Sheffield, Britujo
69. G. E. Collis, Leicester, Britujo
70. D-ro S. M. Whitaker, Rochdale, Britujo
71. F-ino A. B. Edwards, Bishop Auckland, Britujo
72. F-ino M. Kennedy, Glasgow, Britujo
73. R. B. Wilkinson, London, Britujo
74. S-ino M. E. Wilkinson, London, Britujo
75. F-ino E. M. Wheatley, Birmingham, Britujo
76. F. Curtis, Bristol, Britujo
77. F-ino H. Steele, Southport, Britujo
78. G. W. Roome, Sheffield, Britujo
79. H. Ingham, Liverpool, Britujo
80. F-ino D. Ingham, Liverpool, Britujo
81. F-ino M. Ingham, Liverpool, Britujo
82. T. R. Sutherland, Liverpool, Britujo
83. F-ino S. F. Sutherland, Liverpool, Britujo
84. A. Fisher, Parkstone, Britujo
85. S-ino D. Fisher, Parkstone, Britujo
86. F-ino M. Diggles, London, Britujo
87. S-ino E. Warren, London, Britujo
88. F-ino E. F. Mayhew, Leicester, Britujo
89. N. H. Smith, Cambridge, Britujo
90. S-ino M. N. Smith, Cambridge, Britujo
91. S-ino P. Bamford, Warrington, Britujo
92. P. C. Taylor, Manchester, Britujo
93. J. Cresswell, Manchester, Britujo
94. F-ino M. W. Gee, Huddersfield, Britujo
95. A. H. Middlemast, Airdrie, Britujo
96. A. A. Ager, Beckenham, Britujo
97. F-ino S. E. Baldock, London, Britujo
98. F-ino A. G. MacFarlane, Glasgow, Britujo
99. F-ino A. L. Richardson, Whitley Bay, Britujo
100. B. Bekman, Strängnas, Svedujo
101. F-ino L. Schaerer, Langenthal, Svisujo
102. R. Zollinger, La Chaux-de-Fonds, Svisujo

Letero el Ĉinujo

Jam de 1942 mi ne legis eksterlande eldonitan gazeton, nek povis havigi al mi kiun ajn libron verkitan de eksterlanda Esperantista verkisto aŭ tradukinto. Imagu, do, mian eksciton kiam post pli ol kvar jaroj unuafoje mi ricevis *E.J.*!

Mi mem instruas Esperanton al junaj kolegoj per la rekta metodo, kaj ili bone komprenas tion, kion mi esprimas per simplaj frazoj. Krome mi instruas plurajn gekamaradojn per korespondado.

En Ĉinujo la Esperanto-movado saĝe estas nevigla, malgraŭ ke en Ĉentuo aro da geesperantistoj energie klopodas por diskonigi la lingvon. La ĉefcentro de la movado en nia lando nun estas Ĉunkino malgraŭ ke multaj kamaradoj forlasis tiun iaman ĉefurbon de Ĉinujo. Ekzemple la prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo—S-ro Venlo Fon—jam ne troviĝas tie. Laŭ informo ricevita, oni denove klopodas pri Esperanto en Sanhajo. Mi deziras emfazi, ke la nuna stato de la Ĉina politiko sufokas la verdan movadon.

La vivo ĉi tie estas malfacile tolerebla. Mi estas telegrafisto kaj post la rezistlukto de la Ĉinoj kontraŭ la Japanoj oni trudis al ni la noktodejoron, kiu estas treege streĉa. Tio daŭras de la 21.00a horo ĝis la 7a matene. Antaŭ ol iri al la deĵoro, mi aldonas al bolanta akvo iom da tefolioj. Tiun trinkaĵon mi tre ŝatas dum la deĵoro, precipe dum la somera sezono.

Ĉiam estas bruoj en la laborejo. Oni maŝine kopias la telegrafaĵojn kaj maŝine ilin elsendas. La kopiado kaj sendado faras bruon, kaj aldone al tio la sonoriloj senĉese alvokas. Babilado de neokupitaj deĵorantoj ankaŭ aldonas al la bruoj.

Je la noktomezo mi faras 15-minutan paŭzon por ĝui la nekuiritan manĝon, kiun mi kunportis kun mi, kaj post tio mi senhalte laboras ĝis la 7-a. Ordinare mi trovas la periodon inter la 3.00a kaj la 5.00a horoj la plej streĉa. Miaj okuloj, apenaŭ restas malfermaj, mi sentas min kvazaŭ sub influo de narkotiko kaj la manoj ŝajnas esti tute ekster mia regpovo. Kaj je la hejmeniro post la 7-a, tute ellacigita, la najbaroj plendas, ke mi disrompas ilian dolĉan dormon!

Golabio, Ĉinujo

PARTOPRENU NIAN INTERNACIAN FESTON !

ALIĜU AL LA KONGRESO NUN

Aliĝiloj haveblaj ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe I.E.L.

ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	20.00-20.30	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 25.34m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. Poresperanta parolado.
	20.00-20.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	20.30	Warszawa III (Polujo). 49.06m. Politikaj informoj.
Mardo	17.50	Sofia (Bulgarujo). 32.5m. Prelegoj. Radio Sofia.
	20.00-20.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	21.50-22.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Radiostacio, Moravska Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	17.30-17.40	Hradec Králové-Pardubice (Ĉeĥoslovakujo). 280m. Esperanto-programo. Vychodočesky vysilač (Orientbohema radiostacio), Hradec Králové.
	20.00-20.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	18.05	Bern (Svisujo). 47.28m. Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat.
	20.00-20.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	15.10-15.30	Sveda Radio. 19.80m. Esperanto-programo. Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm. Nur je la 15a de novembro (ankaŭ je lundo la 16a de decembro).
	17.50	Sofia. (Bulgarujo). 32.5m. Prelegoj. Radio Sofia.
	19.45-20.00	Hilversum (Nederlando). 415m. Esperanto-elsendo de la Nederlanda Kristana Radio-Asocio. N.C.R.V., afd. Omroep, Postbus 5, Hilversum. (Nur je la 20 de decembro).
	20.00-20.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.30-20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
	21.50-22.00	Moravska Ostrava. 325.4m. (kiel je mardo).
Sabato	01.00-01.30	Sveda Radio. 31.46m. kaj 49.46m. Ripeto de la vendreda programo por ekster-Eŭropaj landoj. Nur je la 16a de novembro (ankaŭ je lundo la 17a de decembro).
	16.30-16.45	Wien (Aŭstrujo). Kurso kaj informo.
	19.00-19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	20.00-20.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.00-20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon, sed notu ke pro la fino de somera tempo oni eble ŝanĝas la horojn de la elsendoj je unu horo. Ni urĝe petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuleterojn kaj informojn pri ricevado.

RECENZOJ

* = akireblaj ĉe I.E.L.



***La Virineto En Bluo** kaj aliaj rakontoj: orig. verkita en Esperanto de Mason Stuttard; Epoko-Libro N-ro 8, 150 p., 18.5×11.5 cm; prezo broŝ. 3 ŝilingoj, afranko 3 p. (13 respondkuponoj).

Du personoj recenzis ĉi tiun libron, kaj jen la rezulto, kiu certe interesos la leganton!

A

La dektri rakontoj, kiuj konsistigas la okan volumon de la prave ŝatata libro-kolekto "Epoko", mi ĵus ellegis. Pleniginte mian fontplumon, mi pretiĝas surpaperigi recenzon pri ĝi; finiĝis la amuzo, komenciĝas la turmento... Se nur mi kuraĝus obei mian unuan impulson, tiun verkotan recenzon—pardonpetante pro la tro familiaraj vokativoj pafataj al kunfrato persone ne konata de mi—mi limigus per la jenaj frazoj:

Ho! Mason Stuttard, kiel vi tiom sorĉe plezurigis min?

Ho! Mason Stuttard, kial vi tiom agace ĉagrenis min?

Sed mi rekonas, ke tia lakoneco ne sufiĉus por satigi la rajtan scivolemon de la legantoj. Cetere, mi kredas, ke mi kapablas preskaŭ ĝuste respondi pri ambaŭ demandoj.

Sian fonton mia plezuro havas en la elstara talento priskriba de la aŭtoro de *La Virineto en Bluo*. Vere potenca, ĉi tiu talento! Kelkaj vortoj, sed ĝuste elektitaj; kelkaj frazeroj, sed lerte-trafe turnitaj sufiĉas al tiu riĉe dotita beletristo por skizi, desegni, pentri, vive-tuŝe elvoki laŭvice lordan patrodomon, malnovan kamparan trinkejon, ĉe-maran aŭ arbaran pejzaĝon kaj ankaŭ romantikan junulon, elturnigeman senpatrujan poligloton, maljunan, tamen naivan fraŭlinon, muzikeman ministron, sukcesintan analfabeton, k.a. . . . Kaj ĉiujn, homojn, bestojn, kreskajojn, lokojn, pejzaĝojn, per fea povo, li sukcesas montri en ilia propra atmosfero, prilumatajn de la taŭga lumo. Jen kiel Mason Stuttard sorĉe plezurigis min kaj sorĉe plezurigos kiun ajn leganton.

Pri la dua demando . . . Nu, mi konfesu, ke mi ĉagrenetiĝis, ĉar tia talentoplena viro tro facilanime elektis por siaj rakontoj temojn jam antaŭe kaj ne unufoje pritraktitajn en naciaj literaturaĵoj eĉ, eble, en Esperantaj. La temo de *La Virineto en Bluo*, kvazaŭa "reviviĝo" de geamanta paro post jarcentoj, jam allogis kelke da verkistoj, kaj same pri *La rigardo mortiga*. La kerno de *Naivuloj Alilande*

aŭ de *La danĝera loko* estas nuraj ŝercaĵoj, jam de jaroj velkintaj . . . Mi ja scias kaj ne forgesas, ke en artaj verkoj pli gravas la formo ol la fundo, kaj en la konsiderata libro la formo estas senriproĉa, eĉ laŭdinda senrezerve. Tamen mi ne povas ne bedaŭri, ke drapirante per sia bela, riĉa, fleksebla literatura ŝtofo personojn nete konturitajn kaj vive skulptitajn, la verkinto tro modeste kontentiĝis per tiaj malfirmaj pretekstoj.

Kaj pri la lingvo? Nu, pri la lingvo nur laŭdojn mi povas direkti al la aŭtoro. Ĉiu leganto de *E.I.* bone scias, kian simplan, klaran tamen artan Esperanton li majstre mastras, kaj tute prave vidas en li unu el niaj plej bonaj prozistoj. Ĉi tiun opinion plene konfirmas la lingvaĵo en *La Virineto en Bluo* same kiel en la aliaj rakontoj. Kvankam mi ŝvite strebis al malkovro de malglataĵoj—mi ja estas recenzisto!—nur du-tri aferetojn mi sukcesis elpinci. Jen ili: tro ofta uzo de *je* en okazoj, kiam sin trudas mem pli precizaj prepozicioj; kelkaj ne tre klaraj kunmetitaj vortoj, ekzemple *profetoriski* kredeble por *riski profetaĵojn*; *kremolakto* por probable *kremoriĉa lakto*; *plumbostano* sendube pro aloyo de stano kaj plumbo . . . hm! ĉu iu iam sentis la bezonon precizigi, ke lia poŝhorloĝo estas el *kuprooro*? Entute, veraj bagateloj, kiujn mi notis nur pro profesia konscienco. Nur legu *La Virineto en Bluo* kaj poste *La subskribo* kaj ankaŭ *Maljuna Ŝmit*, kaj se vi estas pli sincera ol malica, pri kio mi ne dubas, vi diskonigos laŭte-ripete, ke Mason Stuttard estas perfekta stilisto.

Georges Avril, Francujo

B

La Epoko-Serio per siaj sep unuaj volumoj faris al si reputacion pri interesa legaĵo en la formo de tradukoj el la lingvoj angla, franca kaj hungara. *La Virineto en Bluo* estas ne nur la unua originala verko en tiu serio, sed ankaŭ verŝajne la unua originala novelaro de brita esperantisto de post la apero de *Bahŝiŝ* (Newell).

La noveloj kolektitaj en tiu ĉi libro estas interese rakontitaj, kaj la libro tiel bone taŭgas por la distrado, kiel iu ajn alia el la Epoko-libroj. *Naivuloj Alilande* kaj *La Rigardo Mortiga* impresas pli originalece ol la pli multaj el la aliaj rakontoj, pri kiuj oni ofte sentas, ke oni jam aliloke legis similan historion, iom alimaniere rakontitan.

La lingva nivelo estas ne tiel alta, kiel oni atendus, kaj de la eldonistoj kaj de la aŭtoro. Povas esti, ke la rakontoj estis verkita antaŭlonge, kaj ke ili ne estis

sufiĉe zorge reviziitaj antaŭ la presado; ĉi tio prezentas sin kiel la plej verŝajnan klarigon pri la multaj stilaj malbelaĵoj. Precipe ĝenas la leganton la ĉieaj anglismoj, kiuj donas impreson kvazaŭ de tradukado el la angla lingvo, kaj la mankhava interpunkcio, kiu, anstataŭ helpi la legadon, ĝin multloke malhelpas.

Kelkaj detaloj de vortuzo estas kritikindaj, ekzemple la jenaj:—p.66, *flirti (la manon)* devus esti *svingi*; p.90, *malaplobigis, komentario — senaplobigis, komento*; p.130, *tenilo — anso*; p.98, *razenejo — razeno*. Kion signifas *zonumo* (p.116)? Sur p.60, oni legas *ekscenrikuloj*, sur p.87 — *ekscenraloj* (preferinde). *Mi proponas eliri* (p.19), *pri kion ŝi faris* (p.64) kaj *pardonu min momenton* (p.139) ne ŝajnas akordi kun la lingvokutimoj. La esprimoj *disstaris* kaj *dise sidis* estas notindaj tial, ke ĝis nun oni ordinare uzas *dis-* nur kun radikoj enhavantaj koncepton pri movado.

Ni, la esperantistaro, ankoraŭ ne posedas inter ni tiom da kompetentaj verkistoj, ke ni jam povas esti tiel postulemaj pri la nivelo de novaj verkoj, kiel povas esti la literaturamantoj de la naciaj lingvoj. Pro tio, oni eble devus ne tro malindulge kritiki la malmultajn provojn, kiujn oni prezentas al ni. Krome, oni devas ne tute malatenti la vidpunkton, nepre unualoke komercistan, de la eldonistoj, kiuj sendube scias el sia akirita sperto, ke la aĉetantoj de distrocelaj verkoj estas multe pli grandnombraj ol la literaturamatoroj—fenomeno ne propra al la esperantistaro, sed kredeble komuna al ĉiuj landoj kaj ĉiuj popoloj. Tial ni devas, ĉe la nuna stadio de nia literaturo, akcepti sen malkontento kion ajn oni donas al ni, kondiĉe ke ĝi estu interese kaj ne tro malbonstila verkita, ĉiam esperante, ke de tempo al tempo ni ricevos ion eksterordinaran, ion, kio estos komparebla almenaŭ kun la verkoj de la plej kompetentaj nacilingvaj aŭtoroj, se ne kun tiuj de la unuaranguloj.

Alec Venture, Anglujo

***La Trovita Feliĉo** : orig. novelo de Tibor Sekelj. Eld. "Progreso", Buenos Aires. 20 p. broŝ. 17.2×12.5 cm., prezo 9p. aŭ 3 r.p.k., afrankite.

Rakontoj pri psikaj spertoj ĉiam estas popularaj, precipe ĉe homoj kiuj nenion scias pri la psikologio, kaj kies intereso simple estas reago de nescianto antaŭ por li mistera fenomeno. Verŝajne do ĉi tiu senpretenda novelo, kiu parenteze estas la unua originala Esperanto-verko el Argentino, trafos bonan akcepton. Ĝi tion meritas, ĉar la aŭtoro prezentas per ĝenerale bona kaj simpla lingvo interesan

rakonton, kun epizodoj psike kunligitaj, kvankam li lasas la leganton iom scivola pri la efektive vera signifo de la kurioza enigmo, kiun li lerte kreis. La priskribo *Novelo legebla por kursfinintoj* estas taŭga malgraŭ du-tri eraroj. Sur paĝo 9, la unua *nek* estas troa ĉar kun la antaŭiranta *ne* ĝi formas duoblan negativon; kaj sur p.10 *spirante* kaj *sufokigante* devus esti adjektivoj kun akuzativo. Interesa idiotismo estas la *kuracisto falis el surprizo en surprizon*. p.19. Preso kaj papero bonaj.

Gratulon al la aŭtoro pri bona unua verketo.

Mason Stullard

Aperis *Senŝtatano*, monata informilo de Provizora Komitato de Junul-Anarkista Internacio. Adm. 1, rue Fontaine-au-Roi, Paris (11), Francujo.

Alvoko al la Popoloj de la Mondo. Deklaracio farita en Konferenco pri Mondregistro en Kolegio Rollins, Winter Park, Florida, Usono, Marton 11-16an, 1946. Havebla ĉe I.E.L.—Delegito en Winter Park, S-ro Edwin L. Clark.

Breve Historia del Esperanto : Daniel Quarello : eld. Quarello & Cía, Buenos Aires ; broŝ. 30 p., prezo \$0.30 arĝ. Jen tre alloga libreto nacilingva, kiu celas vekti la intereson pri Esperanto ĉe Hispanlingvanoj. Efektive ĝi estas la enkonduka parto de iom ampleksa libro *Aprenda el Esperanto (Lernu Esperanton)*, kaj la evidenta intenco estas decidi la leganton sekvi la plenan kurson. La ĉapitroj estas agrable mallongaj, kaj la tuta enhavo, bonege presita kaj aranĝita, sendube retenos la atenton de serioza homo kun iom da klereco. Aparte grava estas la lingvista ŝato de la aglutina principo de Esperanto.

Edward G. Lock

DUM LA MILITO

Tombejo . . . Maja tago . . .
Militkaptitoj tri
fosajon fosas apud
piedo de lili' . . .

kaj en la truon ili
enmetas korpajn kvar,
argile ilin kovras
per ŝtala fosilar',

kaj eksalutas ilin
per lasta amovort',
pensante mute : "Tia,
jes, estas la Abort' . . . !"

Karolo Piĉ, Ĉeĥoslovakujo

PROpono PRI ESPERANTA INFORM-SERVO

Kio estas bona civitano? Antaŭ kelke da jaroj la vorto signifis nur anon de nacio aŭ de socio. Bona civitano estis respektinda persono, kiu ne trafis en malliberejon, kaj kiu sin okupis pri siaj propraj aferoj. Fakte, la vorto prezentis aron da ecoj kaj virtoj negativaj. Hodiaŭ ĝi signifas multon pli. Bona civitano hodiaŭ devas kontribui ion pozitivan, ion propran, por la bono de sia komunumo, kaj de tiu pli vasta komunumo, la homaro.

Esperantistoj ĉiam estis civitanoj laŭ tiu lasta signifo. La ideo mem de lingvo internacia sugestias celon kaj praktikan utilon, kaj antaŭsupozas definitivan bezonon. D-ro Zamenhof esperis, ke tia lingvo alportos pli bonan komprenon al la homoj kaj al la nacioj. Esperanto estas la perilo, per kiu ni transdonas niajn pensojn al aliaj homoj, kaj ofte ĝi estas la sole disponebla komunikilo.

La Esperantisto tial—kia ajn estu lia haŭtkoloro, lia kredo aŭ nacio—jam aliĝis al tio, kion H. G. Wells nomis la *Open Conspiracy (Malsekreta Konspiro)*. Kiel Esperantisto li jam laboras por tiu pli bona interkomprenado, kiu sole kapablos savi la mondon de ĉiam reokazantaj militoj kaj malsatoj—ja el finfa perejo.

La problemoj, kiuj frontas al ni nuntempe en la postmilita periodo, estas gravegaj. La elvolviĝo de la uzo de atoma energio jam certigas, ke ankoraŭ unu mondkonflikto sekvigus tiel ampleksajn rezultatojn, ke la nuna homa civilizacio pereus, kaj sukcesus enprofundiĝi la homaron en mensan kaj moralan mallumon.

Tion plene konscias respondecaj homoj en ĉiuj landoj, kaj ĉiuj kore deziras fari sian eblon por eviti tian katastrofon. El simila ĉiesa deziro post la unua mondmilito la Ligo de Nacioj rezultis. Sed la Ligo malsukcesis, kaj inter la multaj faktoroj, kiuj kontribuis al ĝia malsukceso, plej potenca sendube estis la manko de interkompreno, kaj precipe la nekapablo efektive konstati, kion efektive opinias kaj kredas la aliulo. Nun, post la dua mondmilito, la minaco de pluaj konfliktoj denove naskis provon starigi la pacon de la mondo—la Organizaĵo de la Unuigitaj Nacioj. Ĉu tiu organizaĵo kapablos sukcese lukti kun la problemoj, aŭ malsukcesos kiel sia antaŭirinto, grandparte dependos de individua klopodo de respondecaj homoj en ĉiuj landoj; kaj tiu klopodo estos efika nur, se ĝi estas bazata sur klare informitaj pensado kaj diskutado.

Estas precipe grave, ke instruistoj, ĵurnalistoj, gvidantoj de junulaj kluboj kaj plenanĝulaj diskuttrondoj povu ricevadi

precizajn informojn pri temoj de aktuala nacia kaj monda graveco. La celo de ĉi tiu artikolo estas, montri kiel tiaj informoj estas riceveblaj.

Jam de kelka tempo la Asocio por Edukado pri Civitaneco (Angle: *Association for Education in Citizenship*) per sia Informa Servado kreis por si reputacion pri nepolitika, senpartia kaj fidinda fonto de faka informado. Lernejoj, kolegioj, studentoj kaj instruistoj, organizitaj korporacioj kaj unuopaj homoj profite utiligadis ĝiajn servojn. *Informa Servado* nun, en kunlaboro kun Brita Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Ligo, deziras starigi similan servadon por la Esperantistaro.

La celo de ĉi tiu servado estos duobla: antaŭenigi Esperanton kiel mondhelp-lingvon: provizi al Esperantistoj fidindajn informojn, kaj respondi unuopajn inform-petojn. Multo dependas de vi. Ĉu tia servado estos utila al vi? Kiajn informojn vi deziras? Se la afero vin interesas, bonvolu skribi al la Asocio por Edukado pri Civitaneco, 51 Tothill Street, London S.W.1, Anglujo.

Eble helpas al vi pli klare taksii nian aferon, se ni donos kelkajn detalojn pri nia Angla Informa-Servado. Nuntempe la informservano pagas jaran kotizon de 10½ sil. kaj por tiu sumo rajtas dum la koncerna jaro fari tiom da informpetoj, kiom li deziras. Ĉiuj petoj estas respondecaj kiel eble plej amplekse, kaj la respondoj estas afrankitaj. Neniu demando estas tro bagatela, nek tro granda. Krom tio, ĉiu abonanto ricevas ĉiusemajnan *Novaĵfolion (News Sheet)*, kiu havas la formon de taglibro de la ĉefaj okazaĵoj en la koncerna semajno, kun notoj por gvidi diskuton. Ĉiu abonanto rajtas peti pluajn detalojn pri kiu ajn aŭ ĉiu el la okazaĵoj menciitaj en la novaĵfolio. Krome, specialaj Informiloj aŭ Memorandumoj estas sendataj kontraŭ peto je malalta prezo, (nur sufiĉa por kovri la produktokoston kaj afrankon). Notoj ankaŭ estas pretigitaj por prelegistoj kaj ĵurnalistoj. La Asocio eldonas librojn kaj broŝurojn aparte interesajn por tiuj, kiuj interesiĝas pri edukado. La organizaĵo estas neprofitema, edukada entrepreno kun la celo antaŭenigi kaj disvastigi klerigon pri civitaneco, sub kiu oni komprenu la dresadon pri la moralaj ecoj nepre necesaj ĉe civitanoj de la demokratio; la antaŭenigon de klara pensado rilate ĉiutagajn aferojn; kaj la akiron de scio pri la moderna mondo. La Asocio havas nenian

LA LEGANTO PAROLAS

La Petskribo

S-ro V. el Parizo skribas: Ĉu 106,314 subskriboj estas tiel ĝojiga sukceso? Por ricevi respondon, oni demandu al tiu, kiu faris subskribon antaŭ ses monatoj. Jen la respondo, kiun mi ricevis: "Nur tiom! Sed mi kredis, ke estas pli ol unu miliono da Esperantistoj en la mondo, do devus esti malpeje unu miliono da subskriboj!"

Mi opinias, ke momento de gratulo jam pasis, kaj tre afabla taŭzeto iom pli efikus. Ni ne forgesu, ke la registaroj rigardos Esperanton, kiel seriozan aferon nur se oni povas almenaŭ kredi, ke ni estas fortega anaro. Ĉar ili scias, ke la Petskribo estas publika deziresprimo, ili nepre konkludos, ke la formuloj subskribitaj de Esperantistoj estas tre malmultaj. Estus, do, danĝere fine prezenti eĉ nur unu milionon.

Tiuj 106,314 subskriboj iom timigas min. Mi ja scias, ke ne ĉiuj Esperantistoj estas I.E.L.-anoj, kaj tamen tiu cifero ne reprezentas po 10 subskriboj por ĉiu I.E.L.-ano! Laŭ mi, kiu facile subskribigis pli ol 100 personojn kaj scias, ke multaj samideanoj jam ricevis pli multajn subskribojn, ŝajnas ke 20 devus esti minimumo por ĉiu I.E.L.-ano. Kiu ne havas 20 parencojn aŭ amikojn? Tiel la meznombro povus esti 100. Tio estas nepre necesa. Malpli estus danĝera argumento pri nia malforteco.

Denove pri "D-ro Dornier"

La artikolon de kanonika moŝto V. Heylen pri la libro *D-ro Dornier*, de H. L. Egerrup, mi volas ne lasi sen kontraŭdiro. Estas vere, ke la Kristana eklezio konas aliajn rimedojn por plibonigi la homaron, krom tiuj, kiuj estas priparolataj en la koncerna verko, kaj ankaŭ estas ĝuste, ke la homo konsistas el pli ol tio, pri kio oni ricevas impreson per legado de *D-ro Dornier*.

Tamen la artikolo de V. Heylen donas falsan komprenon pri kaj H. L. Egerrup kaj lia verko. Estas malĝuste diri, ke la libro klopodas entuziasmi la leganton pri nazia kaj militisma vivokoncepto. Ekzemple la vidpunkto pri rasproblemo, kiun la libro favoras, estas tute kontraŭa al tio.

La verko, *D-ro Dornier*, traktas problemon, kiun la Kristana eklezio pli malpli frue absolute devus pritrakti kaj prijuĝi, ĉar ĝi estas problemoj nepre solvendaj. En la verko la problemoj ne estas pritraktataj tiom multflanke, kiom oni povus deziri, sed ĝi estas pritraktata tre klare kaj eĉ en neordinara puranima maniero. Oni devas

en la Kristana eklezio esti dankaj, ke tia problemoj estis prezentataj tiel ke neniu rajtas senti sin malagrabla tuŝata de ĝi. Fakte, oni ne povas imagi, ke oni prezentu la problemon laŭ pli deca maniero. La verko malkaŝas eĉ neordinaran taktoplenan kaj kompreneman aŭtoron.

Kompreneble la kanonika moŝto V. Heylen rajtas kontraŭparoli la opinion esprimitan en la libro kaj informi pri la Kristana-Katolika opinio pri la koncerna problemoj, sed liaj kontraŭdiroj kontraŭ la verko ne rajtigas lin elparoli sian juĝon pri la aŭtoro tiel, kiel li faris.

Pastro Niels Mogelvang Nielsen,
Danujo

Ĉu Dialektoj?

La nepraj kondiĉoj de bonstato de Esperanto en la rilato pri elparolo estas, kaj la parolantoj zorge observu kaj respektu la regulojn. Plejparte oni ja faras tion, sed post interparoladoj lastatempe kun alilandanoj mi konstatis, ke iuj samideanoj inklinaĵoj trudi en sian Esperantan paroladon erarojn, kiuj similas iujn detalojn de la gepatra elparolado. Mi precizigu pere de listeto.

Angloj, priatentu viajn vokalojn! Via gepatra lingvo enhavas multajn diftongojn, kaj la enkonduko de tiaj sonoj en Esperanton estas neplaĉa—eĉ neĝusta. Purajn vokalojn postulas nia helplingvo.

Francoj, via gepatra "r" (krom en la suda parto de Francujo) malfaciligas la komprenon, kiam ĝi aŭdiĝas en Esperanto. Se vi penos elparoli tiun literon per la pinto de la lango, vi helpas alilandanojn. Krome ne forgesu, ke en Esperanto oni devas ĉiam akcenti ne la lastan, sed la antaŭlastan silabon.

Germanoj, atentu, ke "b" malsimilas "p", kaj "d" malsimilas "t". Ekzercu vin dirante, ekzemple "baro, paro" kaj "dono, tono". Serĉu aliajn tiajn parojn kaj ilin elparolu, troigante la diferencojn; ĉar tio, kio al vi povas ŝajni troigo, eble sonas normala en aliaj oreloj.

Hispanoj, "b" tute ne egalas "v" nek skribe nek parole. Do, "boli, voli" kaj ĉiu cetera vorto, kiu enhavas tiujn literojn meritas vian atenton. Emfazo ĉe preskaŭ ĉiu konsonanto helpas al via alilanda aŭskultanto.

Povas esti, ke lerta samideano kompilos kompletan liston de tiaj nacilingvaj detaloj por helpi la ordinaran homon. Tion atendante, ni ĝoju, ke oni ja interkomprenas ĉar Esperanto ne disfalas kaj ne disfalos en dialektojn.

A. G. Tucker, Anglujo

En la Aŭgusta E.I. S-ro Clark proponas plaĉajn kaj ĝustajn tradukojn de kelkaj Anĝlaj poeziaĵoj sen elizio kaj kun kroma piedo en ĉiu verso. Mi, en 1945 Esperantigante (sed senrime) poemon de A. E. Housman nomitan *Inferna Pordego*, tradukis kvarpiedajn versojn per kvinpiedaj kaj kun kroma silabo.

En la ĵusa Junio, Esperantigante la *Morto de Arturo*, mi tradukis ĝiajn kvinpiedajn versojn per kvinpiedaj kun kroma silabo ĉefine (kiel ankaŭ Zamenhof en *Hamleto*), sed tenis min pli regula ol S-ro Clark pri la anakruso (la komenca senakcenta silabo). Jen mia provo de la peco, kiun tradukis S-ro Clark :

Kaj laŭte kriis brava Bedivero
 "Ho mia reĝo, kien nun mi iru ?
 La frunton kaj okulojn kie kaŝu ?
 Nun klaras, ke la veraj tagoj mortis,
 El kiuj ĉiu trovis noblan ŝancon,
 Kaj ĉiu ŝanco noblan kavaliron ;
 Ne tia tempo estis, post ol stelo
 Kondukis la saĝulojn mirhodonajn.
 Sed nun disigis nia Ronda Tablo,
 Iama bildo de la larĝa mondo ;
 Kaj mi, la lasta, sen kunulo migras,
 Kaj sur mi mallumiĝas tagoj, jaroj,
 Kun fremdaj homoj kaj kun mensoj
 strangaj."

Arturo el boato lace diris,
 "La nuna ordo mortas en alian ;
 Kaj Dio sin multvoje realigas,
 Por ke bonmoro unu ne putrigu.
 Konsolu vin : ĉe mi konsolo kia ?
 Finvivis mi ; kaj ĉiun faron mian
 Purigu Li en Si. Sed vi, se poste
 Vizagoŝan mian vi neniam vidos,
 Porpreĝu min : plimulton faras preĝo
 Ol revas nia mondo. Voĉo via
 Fontane levu sin por mi tuttage.
 Ĉar homo ne superas ŝafojn, kaprojn,
 En cerbo vivon blindan nutradantajn,
 Se, Dion jam konante, li ne preĝas
 Por si kaj ankaŭ por amikoj siaj.
 Ĉar tiel la terglobo pendas tuta
 De la piedoj Diaj orĉenare.
 Sed nun adiaŭ. Longen mi foriros
 Kun tiuj ĉi (se mi laŭvere iros ;
 Ĉar mia menso dub-nubiĝos tute)
 Al la insula valo Aŭviljono,
 Sur kiun neĝas ne, nek pluvas iam,
 Nek brue ventas ; sed profundakampa
 Ĝi kuŝas, bela pro herbejoj fruktaj
 Kaj kavaj laŭboj kun somera maro.
 Sanigos mi la gravan vundon tie."

Li diris. La boato de la bordo
 Remleve iris, kiel la plenbrusta
 Mortonta cigno flutas kanton strangan,
 Hirtigas purajn plumojn, kaj eknagiĝas
 Per nigraj plandoj. Longe Bedivero
 Multmemorante staris, ĝis vidiĝis

La ŝipo, nigra punkto en tagiĝo,
 Kaj sur la lago la lamento mortis.

Sed kial eviti la elizion ? Ĉu la apostrofoj malbeligas la paĝon ? Tio mallogas nur pro kutimo : neniuj plendas pri apostrofoj en Homero, sed la Idistoj plendas pri nia troo da "j".

Kelkaj Esperantistoj plendas, ke ili ne povas verki poezie per Esperanto, ne havante apartajn poeziajn vortojn. Se ion tian ni bezonas, eble la apostrofo mem povas servi al la leganto pri la poezia eco, kiel faras ĉe Angloj, ekzemple la uzo de vortoj *ci* kaj *cia*.

Tre povas esti, ke la literaturo de kiu ajn lingvo komenciĝas sur erara vojo. Ekzemple, Latinaj poetoj verkis unuatempe laŭ akcento :—

*Immortalés mortales sí forét fas flere
 Flerént divalé Caménac Naéviám poétam.*

Sed post la morto de Ennius (169 a.K.) la kleruloj ĉiuj imitis la Grekan kutimon poezii laŭ kvanto (t.e. silaba longeco) ; kaj nur kiam Kristanaj himnistoj deziris logi ankaŭ la neklerulojn, revenis la poezia akcento. Ankaŭ la Angla poezio komenciĝis ne per rimo, sed per aliteracio, kaj nur imitante la Francojn oni lernis rimi. Ni, do, forĵetinte la ekzemplojn de Zamenhof kaj Grabowski, eble tiel bone verkus kiel Vergilio kaj Shakespeare. Eble !

G. Rust, Anĝlujo

LA POETO

La poet' similas
 iam al monaĥ',
 kiu malgraŭ multaj
 ho kaj multaj aĥ

skizas sanktan libron
 per purpur' kaj or',
 inkumante ĝin per
 sang' de sia kor' ;

kiu laboreme
 iras tra la viv'
 sen zorgad' pri moko,
 kraĉo aŭ saliv',

ornamante paĝojn
 kun plezur' kaj ort',
 dum trans mur' atendas
 eble jam la mort',

kiu ĉion fermas
 per mutanta pal' . . .
 Tamen nefermita
 restos la Misal' * . . .

Karolo Piĉ, Ĉekoslovakujo

* sankta meslibro.

LA TUTMONDA STUDENTARO KAJ LINGVO INTERNACIA

Mia artikolo en la Aprila número de *E.I.* vekis sufiĉe da atento en Esperantujo. La artikolo pritraktis du aferojn: mian kontakton kun la Prepara Komitato de la Unua Tutmonda Kongreso Studenta 1945 en Praha, kaj due, alvokon aliĝi al faka kunlaborado kun Ĉeĥoslovakaj jurstudentoj. Alvenis aliĝoj el sep landoj.

En Aŭgusto de la nuna jaro okazis la dua Tutmonda Studento-Kongreso en Praha. Okazis grava instigilo, kiu kaŭzis, ke unu el la Kongres-Komisionoj tuŝis la problemon pri internacia helplingvo. Ĝi estas merito de memorandumo de la Studenta Esperanto-sekcio de la Bulgara Ĝenerala Studenta Popola Asocio, kiu estis sendita ne poŝte, sed pere de la gvidanto de la Bulgara Deleĝitaro, S-ro Emil Rosenstein.

Per prunteprenita legitimilo (sen kiu oni ne povis eniri) mi sukcesis penetri en la kunsidon kaj rigardis scenon, kiu neniam vidiĝis en Esperanto-kongreso. Tiu parto de la deleĝitaro—kunveninta el ĉiuj mondpartoj—kiu ne komprenis la lingvon tiumentome parolatan, babilis, manĝis, skribis privatajn leterojn kaj efektive amuzis sin, atendante ĝis kiam aŭdiĝos lingvo, kiun ĝi komprenas. Kompreneble tiu cirkonstanco iom ĝenis la aliajn deleĝitojn.

Per la afabla helpo de Bulgara studento, kiu konas persone la gvidanton, S-ron Rosenstein, mi intervjuis tiun homon, ne persone, sed per skriba demando, kiun mia amiko faris al li. Mi opinias la rezulton de tiu intervjuo tre grava, ĉar ĝi montras la vojon, kiu povos konduki al la celo. Jen la demandoj kaj respondoj:

D. Kion postulis la letero de la Bulgara Studenta Esperanto-sekcio? R. La letero postulis, ke la Kongreso permesu oficialan uzadon de Esperanto en la Kongresaj diskutoj, apud la naciaj lingvoj. D. Kiuj deleĝitaroj partoprenis la diskuton pri Esperanto? R. La Rusa, Angla, Franca, Bulgara, Hinda, Sud-Afrika kaj eble aliaj, kiujn mi ne memoras. D. Kia estis la konkludo el la diskuto pri Esperanto? R. Ĉiuj deleĝitoj de la kunsido havis la opinion, ke Esperanto ne estas nun sufiĉe popularigita, t.e. disvastigita, precipe ne inter la kongresdeleĝitoj. Kelkaj deleĝitoj opinias, krome, ke nun ne estas oportune paroli pri internaciismo, kiel ekzemple pri lingvo internacia, en la Kongresaj kunsidoj. La nuna Kongreso havas pli gravajn laborojn kaj oni povas prezenti ĉi tiun demandon al iu venonta kongreso. D. Kia

estis tamen la ĉefa kaŭzo, ke la komisiono en tiu ĉi kongreso ne akceptis uzadon de Esperanto en la interstudenta rilatado? R. La plej grava kialo estas la cirkonstanco, ke neniu deleĝito scias kaj uzas Esperanton. D. Ĉu ankaŭ la Plenkunsido traktis pri Esperanto? R. Ne. D. Ĉu vi povas konsili al Esperantistoj la plej efikan manieron por interesi la studento-organizaĵojn pri Esperanto? R. Volonte. Skribu petskribon al la Ekzekutiva Komitato de la Konsilantaro de la Internacia Federacio Studenta, kies daŭra sidejo estas en Praha II, Opletalova 38, Ĉeĥoslovakujo, en kiu vi rekomendos lernadon de Esperanto kaj postulos, ke la Administra Komitato prezentu al la venonta kongreso proponojn, ke Esperanto estu akceptata kiel oficiala kongreslingvo. Sed kondiĉo estas, ke la petskribo estu sendata de studentaj grupoj aŭ organizaĵoj, aŭ de studenta sekcio de landa asocio, do, sole de studentoj-Esperantistoj. Petskriboj de nestudentoj estas sensignifaj. Krome estas grave, ke la petskribo estu skribita en nacia lingvo, ne nur en Esperanto, aŭ pli bone, en kelkaj lingvoj samtempe; sed ĝi devas esti subskribita de studenta organizaĵo. D. Ĉu la Esperantistoj povos fidi je via helpo en la estonteco? R. Kvankam mi ne estas Esperantisto, mi estas preta subteni Esperantismon kaj mi esperas, ke vi havos sukceson en la venonta studenta kongreso.

Jen la enhavo de la tuta intervjuo. La studentoj en la tuta mondo, do, klopodu pri akceptigo de Esperanto en la oficialaj studentaj rondoj.

J. Mařík, Ĉeĥoslovakujo

AŬTUNO

Post griza kupolo el nuba tavolo
Sin kaŝas la suno;
Jam pasis somero kaj sur nia tero
Ekregas aŭtuno.

La vento deliras, ĝi branĉojn deŝiras
Foliojn semante.
Ĝi skuas la domojn kaj puŝas la homojn,
La polvon pelante.

Kaj mi malkontenta dum pluvo torenta
Rigardas eksteren;
Mi vidas enue la pluvon senbrue
Falantan nun teren.

Mi ĝeme sopiras, malgaje deziras:
Rebrilu, ho suno!
Respondas nur vento kaj pluva torento,
Ĉar regas aŭtuno.

J. H. A. Sens, Nederlando

LA GERMANA ESPERANTISTO

La demando ĉu Esperanto estas sole lingvo aŭ ĉu ankaŭ ideo fariĝis denove aktuala. Tio vidiĝas per la artikolo *Unu Grandan Rondon Familian*, kiu aperis en la Julia numero de *E.I.* kaj tio vidiĝas precipe en la postmilita praktiko de la Esperanta movado.

Ĉu la homoj, kiuj nomas sin *samideanoj*, vere scias kion tiu vorto signifas? Ĉu ili scias, ke la interna ideo de Esperanto—la Esperantismo—estis preskaŭ pli kara al nia majstro, ol la lingvo mem? Oni legu la verkaron de D-ro Zamenhof kaj tiel oni ne konfuzos Esperanton kun kia ajn ŝovinismo.

Ĉi tiu atentigo estas en la nuna momento des pli grava, sekve de la sinteno de iuj Esperantistoj, kiuj nomas sin *samideanoj*, sed kiuj efektive estas nur *samlingvanoj*.

Esperanto estis kreita por forigi malamon kaj semi amon. La granda espero de Esperanto estas kunigi la tutan homaron en unu rondon familian. Se ni volos esti indaj de Esperanto kaj de ĝia kreinto, ni devos enkorigi tiun grandan esperon, kaj fari ĝin la fundamento kaj leĝo de nia vivo, persona kaj socia.

Iuj Esperantistoj ŝajnas ignori tion precipe en siaj rilatoj kun niaj Germanaj gesamideanoj. Ili ne povas aŭ ne volas forgesi la persekutojn kontraŭ siaj samlandanoj aŭ samgentanoj dum la milito, kaj faras la tutan Germanan popolon respondeca pri iliaj suferoj. Ili tamen forgesas, ke grandaj partoj de la Germana popolo suferis almenaŭ tiel multe kiel ili. Ĉar se la persekutoj kontraŭ alilandanoj komenciĝis dum la milito, aŭ pli precize dirite en 1940, tiuj kontraŭ la Germanaj demokratoj kaj aparte kontraŭ la Esperanta movado, komenciĝis en 1934! Koncentrejoj por Germanaj socialistoj, komunistoj, anoj de metiunuiĝoj, pacifistoj kaj aliaj diversnancaj demokratoj estis kreitaj en 1933! Kaj se la viktimoj de aliaj nacianoj estas kalkuleblaj per dekmiloj, tiuj el la Germana popolo estas kalkuleblaj per centmiloj!

Estas jam tempo, ke la homaro kaj precipe la Esperantistaro komprenu tiun fakton. La suferoj de tiuj kiuj rezistis la nazi-reĝimon estus vanaj se oni ne komprenus kaj respektus la suferojn de tiuj, kiuj estis la unuaj viktimoj de la reĝimo. La Germanaj Esperantistoj—ĉar la kruelajtoj estis farataj de siaj samlandanoj—humile sin klinas antaŭ la suferoj de la viktimoj alilandaj, sed atendas ankaŭ, ke la alilandanoj ne kondamnu senkritike la tutan Germanan popolon, kaj aparte la tutan tiean Esperantistaron.

Samideanoj, ni gardu nin semi denove

malamon, ĉar tio kondukos certe al novaj suferoj kaj katastrofoj. Ni komprenu kaj enkorigu la spiriton de la Esperantismo en la vera Zamenhofa senco, ĉar sole tiumaniere ni pruvas nin indaj de nia majstro kaj helpas la efektivigon de la mondopaco.

Mi ne estas Germano, sed mi suferis kun la Germana popolo ek de la komenco de la nazi-socialista reĝimo. Mi konas la Germanajn Esperantistojn kaj mi scias, kiel ili pensis kaj sentis sub la nazia hegemonio, kaj mi rajtas diri, ke tiuj kiuj kondamnas entute la Germanan popolon faras maljuston ne nur kontraŭ multaj samideanoj, sed ankaŭ kontraŭ milionoj da aliaj senkulpaĵ homoj.

*D-ro Th. Michaltscheff,
Hamburg, Germanujo*

Diana Ĉasistino

Solece apud fonto diafana,
jen sidas sur malmola rok' Diana;
okuloj ŝiaj de belec' sublimes
rigardas fikse ion malprolsiman,
revema ŝia buŝ' ridetas mole,
sed splen' sulkigas ŝian frunton plej
senvole.

Rebrilas eĉ sekreta ardo
el ŝia bela revrigardo.
Dum ŝia brusto delikata
enspiras la aeron parfumatatan;
ĉu ŝajne kun profunda spiro
eliĝas el la kor' sopiro? . . .

Kaj ĉirkaŭ ŝi spurflaras ŝiaj hundoj
zorgeme la kavernajn fundojn,
kaj pro la stranga senmoveco
silentas ili pro apreco*
kaj pro respekto por l' estrin'
ĉar ili ja fidele amas ŝin.

Timema cerv' en malproksimon kuras for;
ne vidas ŝi ĝin, sed en hor'
la hundoj gaje bojas
pro la neatendito ĝojas
kaj kuras tuj post la fuĝantan beston,
al ĝi impetas ili kun majesto.

Subite kun sopiro ŝi ekstaras,
ankoraŭ senkonscia, pri kion ŝi faras;
la kapon ŝi ekskuas,
ĉu iu zorg' elfluas
el delikata la kranio,
ĉu flugas for melankolio?

Sed la Naturo vokas ŝin
al aliloka la destin';
fariĝas movoj ŝiaj
denove plej pasiaj,
denove estas la kuraĝulino
ŝi, la eterna ĉasistino.

Paŭla Mesotten, Belgujo

*=ŝato.

ENIGMA KONKURSO N-ro 9

Solvajn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo

Solvaj de la enigmoj el konkurso N-ro 7

N-ro 17: Koto-varfo, okro-ploto, notobalaj, sino-kapti, caro-stuki, ingo-treme, erco-edifa, nabo-trili, celo-ferio, orfo-pasto, tero-bramo, rapo-aleno, aldo-knare, nomolarvo, kelo-vante, vizo-akuta, ingo-kanti, lito-dungo, arbo-fandi, ekio-karlo, sito(blua pego)-sarki, turo-karbo, arto-gesti, semoglasta, beto-gramo, orlo-gasto, nabo-brulo, ardo-lenso, dato-kremo, ordo-manko, ranomaski, maro-gnomo, ingo-lampo, lakolunde, oleo-manke.

Konscienco trankvila estas bona dormilo.

N-ro 18: Aristokrato, dekalitro, stampilgravuristo, melodio, kaporalo, dekoracio, violonĉelo, memorando, borakso, perimetro, redakcio, miriametro, herbosemo, proponi, portero, peristilo, aeroplano, periodo, protestanto, neolito, prokrasti, reala, superjaro, apartamento, poetiko, karamelo, oleujo, piastro, kvintesenco, unuaranga, respubliko, diskurso, ekonomo, kvartalo, miaflanke.

Kaldrono ridas pri (ne "pro", vidu Proverbaro Esperanta de D-ro Z. N-ro 514) potoj, kaj mem estas kota.

Gajnis la premiojn: S-ro H. Westergaard (Dan.) kaj Pastro D. W. Robson (Angl.) kun 73.5 poentoj kaj S-ro Fr. Couwenberg (Belg.) kun 71 poentoj. Al ĉiuj tri mi sendis la libroliston el kiu ili povos elekti sian premion.

Post ili sekvas: S-ino N. Koudijs-Modoo (Ned.) 69.5 p., S-ro L. Paeleman (Belg.), F-ino J. J. v. Thiel (Ned.) 68.5 p., S-ro E. B. Jörgensen (Dan.) 66 p., S-ro E. Maynar (His.) 65.5 p., S-ro T. K. Slade (Brit.), S-ro I. I. Ekström (Finl.), F-ino E. Jayet (Svisl.) 65 p., S-ro P. Kustaanheimo (Finl.) 64.5 p., S-ro P. E. Schwerin (Aŭstralio) 64 p.

Enigmo N-ro 21.

V ¹ I ¹	R ¹ T ¹	U ¹ L ¹ O ¹	7
E ¹ L ²	T ² R ²	O ² V ² I ²	13
T ³ O ³	L ³ E ³	R ³ I ³	17
U ² T ⁴	I ⁴ L ⁴	O ⁴	18
R ⁴ E ³	V ³ U ³	L ⁵ O ⁵	23
I ⁵ L ⁶	E ⁴ T ⁵	O ⁶	26
L ⁷ I ⁶	V ⁴ E ⁵	R ⁵ O ⁷	34
O ⁸ R ⁶	I ⁷ T ⁶	E ⁶	33

Entute 171

La literojn de la vorto "veturilo" mi metis unu sub la alian. Sinsekve komencinte per la literoj de tiu vorto, mi faris novajn vortojn, kiom eble longajn, per la literoj de tiu vorto. Tiel en la vorto "veturilo" kiel en la novaj vortoj ne troviĝas dufoje la sama litero.

Ĉiu litero de la unua vorto "virtulo" valoras 1 poenton. Ĉiu litero de la dua vorto, uzita jam en la unua vorto, valoras 2 poentojn, la aliaj 1 poenton. Ĉiu litero de la tria vorto jam dufoje uzita valoras 3 poentojn, tiuj kiuj estas unufoje uzitaj 2 poentojn, la aliaj 1 poenton, k.t.p. Entute mi tial akiris 171 poentojn.

Mi nun demandas al vi mem elekti oklitan vorton, en kiu ne dufoje troviĝas la sama litero, kaj agi kiel mi faris. Por vorto per kiu vi akiris 150 poentojn mi donos 1 poenton, por 160 mi donos 2 poentojn, por 170 mi donos 3 poentojn, k.t.p. Kondiĉo estas ankoraŭ, ke ĉiuj vortoj estu uzablaj en frazoj.

Enigmo N-ro 22.

ŜOVI KAJ TROVU

REKOMENDI
 PUNLABORANTO
 SENENERGIA
 FRUKTOCENTRO
 ENERĜIO
 INTERKRAMPE
 DOMOALTARO
 FUSLATINAĴO
 KLOPODO

Ŝovu la suprajn naŭ vortojn horizontale dekstren aŭ maldekstren tiom, ke vi samtempe en tri vertikalaj kolonoj legas tri vortojn, kies signifoj estas (de maldekstre dekstren):

1. floro.
2. la plej malakuta el la virinaj voĉoj.
3. frandaĵo.

5 poentoj.

Esperanta Informservo—fino.

tendencon politikaŭ aŭ religian. Ĝia sola celo estas kunhelpi por formi kaj firmigi sur neŭtrala, fakta fundamento objektivite civitanan, memstaran, publikan opinion.

Respondante al nia peto, bonvolu respondi ankaŭ la jenajn demandojn:

(a) Ĉu vi konsentas la ideon starigi Esperantan Inform-Servadon?

(b) Ĉu vi deziras ricevi pli da informo antaŭ ol decidi?

(c) Kio estas via okupo?

(d) Kiaj estas viaj specialaj intereso?

(e) Ĉu vi volos aboni tian Inform-Servon?

Skribu plej klare—nepre preslitere—al la ĉi-supra adreso, kaj donu vian nomon kaj adreson.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 187

OFICIALA INFORMILO

5an Oktobro, 1946

NOVAJ DELEGITOJ (Post la pretigo de la Jarlibro, Dua Parto).

Britujo

Hoddesdon (Herts.). D: J. Finch, "Geddings", Essex Road. Tel: 2108.
FD (Junulgastejoj; Kooperativismo): La D.

Francujo

Angers (M. et L.). D: Comtesse P. de Briey, 4 rue Grandet.

Coudekerque (Nord). D: S-ino L. Venhersecke, 11 rue Molière.

Petite-Synth'e (Nord). D: M. Nogé, 2 rue de l'Avenir.

St. Cloud (S. et O.) FD (Bankaj aferoj): La D.

FD (Filatelo): C. Fournier, 45 rue de Garches.

Italujo

Roma. FD (Studentaj aferoj; Sporto): S. Pampiglione, Via Salaria 58. Tel: 863-434.

Trieste. FD (Universitataj aferoj): B. L. Marini, Via F. Crispi 11.

Polujo

Tomaszów-Maz. D: R. Kesicki, Zytnia 4/6.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

248. S-ro A. Cseh, Den Haag, Nederlando.

249. S-ro J. J. v. d. Stel, Utrecht, Nederlando.

DONACOJ por helpi al la forigo de la defcito: P. H. Mooy 30s., J. Course (Royston) 100s., W. M. Goodes 6s. 9p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Septembro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Septembro 1945:

	1945	1946
Asociaj Membroj ..	3525	7381
Individuaj Membroj:		
MJ	931	1092
MA	1986	4142
MS	154	251
Patronoj ..	24	24
DM	79	99
HM	16	21
	— 3190 —	5629
	6715	13010

Korespondantoj en Septembro:

Ricevitaj	779
Senditaj	2383
	—
	3162

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

NASKIĜOJ

Blasimme—Je 22 Septembro al Ge-sroj A. Blasimme, Piazza Epiro 36, Roma, Italujo, filo nomita Paolo.

Zeballos Morales—Al Ge-sroj Zeballos Morales, Fray Marcos, Urugvajo, naskiĝis filino je 19 Julio nomita Ana María.

MORTOJ

González—Je la 7 Junio subite mortis Francisco González, Delegito en Tucumán, Argentino. Li lernis Esperanton en 1906, kaj estis kunfondinto de la Klubo en Buenos Aires en 1908, kaj de la Grupo "La Vereco" en Tucumán en 1932.

Reed—Je la 7a de Oktobro post mallonga malsano mortis S-ro H. Reed, Letchworth, Anglujo, 80-jara. Patrono de IEL, li estis ĉiam preta helpi la Esperantan movadon.

MI SERĈIS ORON KAJ OLEON

sed trovis

de DAVID FLOOD

Tradukis el la sveda lingvo
KARL GUSTAFSSON

"La verko donas interesajn
priskribojn kiuj distras la
leganton ĝis la fino."

★

Bind. 9s., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe I.E.L.

Mi deziras korespondadon, prefere kun pentristoj. Respondas tutcerte. S-ro Lars Westman, Mariestadsvägen 3, Skövde, Svedujo.

Deziras kompletan kolekton de diversaciaj popoldancoj kun muziknotoj por nia dancgrupo. Rekompence finnaj dancoj. S-ro K. Kokinen, Töölöntullink. 7, Helsinki, Finnlando.

18 geknaboj 10-13 jaraj deziras korespondi. Nepre respondos. Adreso: S-ro H. A. Appel, Z.O. Singel 5, Bergen op Zoom, Nederlando.

Letervesperon aranĝos Esperantista societo en Olomouc, Ĉeĥoslovakujo, por la naskiĝtago de Zamenhof la 14 de Decembro. Skribu tiuj, kiuj deziras korespondi. Respondoj garantiataj. La plej interesaj sendaĵoj estos rekompencitaj per Esperantaj libroj.

Tri lernantinoj (20-jaraj) volas korespondi kun ĉiuj landoj. Respondu al Nina Farley, 120 Richmond Road, Bristol 6, Anglujo.

Deziras interesanĝi ilustritajn gazetojn, poŝtkartojn, kaj korespondadon kun tutmondaj Esperantistoj. Bonvolu enkovertigi la poŝtkartojn. Respondo garantiata. Adreso: A. Mordido, Aljustrel, Tel. 28, Portugalujo.

VERDAJ DONKIĤOTOJ

Originala verko de

JULIO BAGHY

kun propramana subskribo de
la aŭtoro.

★

Bind. 6 ŝil., aŭfranko 6p.

★

Mendu ĉe I.E.L.

LA UNIVERSALA POŝTMARKA REVUO

Oficiala organo de la Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj
(IAPK)

ESPERANTO vere "en la praktiko"

INTERESA FAKTA AKTUALA

Nia ĉefa celo estas praktike propagandi Esperanton de interno eksteren !

Ni invitas la kunlaboron de filatelaj kleruloj kaj spertuloj pri kontribuo de artikoloj kaj verketoj, por fari ĉe pli interesa la enhavon de nia revuo.

Detalojn kaj ekzempleron de la U.P.R. oni povas ricevi kontraŭ freŝa poŝtmarko de sia lando, ĝis valoro de unu respondkupono. Turnu vin al :

P. H. LEWIS (Org. Sek.), XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo.

GAJA LĜANTO PER ESPERANTO

de P. E. SCHWERIN

Spritaĵoj - Vortludoj
Preseraroj - Anekdotoj
Matematikajoj - Rimajoj
Societludoj - Demandaro
Konsiloj por Grupestroj
kaj Kursgvidantoj.

Prezo :

1 ŝil. 3 pencoj, afranko 1p.
aŭ 5 int. rpk. afrankite.

Eldonita de
ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.
Mendu ĉe I.E.L.

LA TROVITA FELIĈO

de TIBOR SEKELJ

Novelo legebla por
Kursfinintoj.

Prezo : 9 pencoj aŭ
3 int. rpk. afrankite.

Mendu ĉe
INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.
Anglujo

IDEALA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

La jenaj numeroj estas nun haveblaj :

La Morea Perlo. D. Simson.

El la nederlanda lingvo tradukis R. Delpasko. 223 paĝoj.

Irisis. Henry 't Sas.

El la nederlanda lingvo tradukis P. van de Vijver. 194 paĝoj.

Sub la Vitra Kupolo. V. L. van Weddingen.

El la nederlanda lingvo tradukis M. Groels. 160 paĝoj.

La Radianta Lotuso. J. D. Degreef.

El la nederlanda lingvo tradukis P. van de Vijver. 193 paĝoj.

La libroj estas bele presitaj sur bona papero, kaj ĉiu havas
ilustritan fortan kovrilon.

Prezo por ĉiu libro 2ŝ. 3p., afranko 3p., aŭ 10 internaciaj
respondkuponoj afrankite.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo